# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo februaro-marto 2022**


## ĜENERALA KUNVENO DE MEL

La anoj de Madrida Esperanto-Liceo ricevas kunvokon de ĝenerala kunveno de la asocio, okazonta lundon la 7an de marto, je la 18:00 (unua alvoko) aŭ je la 18:30 (dua alvoko, pli probabla), ĉe la sidejo (strato Rodríguez San Pedro, 13, 3-7 de Madrido).

La tagordo estas jena:

1.- Raporto pri evoluo de la membraro
2.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la financa raporto 2021
3.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la buĝeto por 2022
4.- Decido pri la jarkotizo 2022 kaj alvoko al repagado se la banko revenigis la monon
5.- Renovigo de la estraro
6.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la Agad-raporto 2021
7.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la Agad-programo por 2022
8.- Decido pri la stoko de 400 ekzempleroj de "El hombre que desafió a Babel", kiuj restas en privata domo
9.- Demandoj, petoj, proponoj
10.- Redaktado, laŭtlego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la kunsido.

La ĉeesto precipe estos virtuala, por ne kunigi multajn homojn ĉe la sidejo. Detalojn pri la maniero rete partopreni petu al la adreso de la asocio: madrid@esperanto.es. La sama adreso validas por ebla transdono de voĉdonrajto.

Atentu pri la 5a punkto: oni devas elekti novajn estraranojn; pripensu vian propran kandidatiĝon, por kontribui al la agado de la asocio.

## PAGOJ KAJ KOTIZOJ

Se vi ne estas ano, vi ankoraŭ povas aliĝi al Madrida Esperanto-Liceo plenigante la aliĝilon kiu troviĝas en la fako "Dokumentoj" de la retejo de MEL: http://esperanto.es/mel/. La kotizo nun restas la sama, 12 eŭroj jare.

Dum la lastaj semajnoj okazis problemoj pri la pago de kotizoj al la konto de MEL. Ili jam ŝajnas solvitaj, kaj do memoru ke la konto apartenas al banko ARQUIA BANCA, kaj la numero de konto estas: ES55 3183 2800 1310 0655 7423.

## PREZENTADO EN RIVAS-VACIAMADRID

La 17an de januaro nia amiko Jorge Brasal prezentis Esperanton en kultura iniciato en la kulturcentro "Federico García Lorca" de Rivas-Vaciamadrid, nomata "Palabras en vuelo".

Ĉeestis ĉ. 30 homoj, kiuj interesiĝis pri la temo kaj faris multajn demandojn.







**nia voĉo** **februaro-marto 2022**

## KURSOJ EN FUENLABRADO

Krom la kurso de Esperanto por komencantoj, en februaro komenciĝis kurso por progresantoj en la sidejo de Fuenlabrada Esperanto-Ligo. Ĉar la kurso troviĝas en la unuaj lecionoj, ankoraŭ eblas aliĝi se vi interesiĝas, sed bv. fari tion rapide, skribante al: esperantoesdetodos@gmail.com.




## NOVA LIBRO PRI ESPERANTO

La profesoro pri sociologio de la Universitato Carlos III, Roberto Garvía publikigis libron pri la historio de la esperantista movado en Hispanio antaŭ la interna milito, kun titolo "Lengua y utopía, el movimiento esperantista en España 1890-1936", eldonita de la Universitato de Granado.

Temas pri tre rigora verko, kiu priskribas kaj analizas la esperantistan movadon en nia lando, kaj la altan pluralecon de la parolantoj de la lingvo, kio ankaŭ eksplikas la postmilitan historion. Pliajn detalojn pri la libro eblas trovi en: https://editorial.ugr.es/libro/lengua-y-utopia_138874/.

## ALPROKSIMIĜAS LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Memoru ke inter la 29a de aprilo kaj la 3a de majo 2022 estas planata la okazigo de la 80a Hispana Kongreso, en la urbo Comillas (Kantabrio, norda marbordo de Hispanio). La kongreso estis programita unue por la jaro 2020, sed devis esti prokrastita pro la Kovim-pandemio. Tiun ĉi jaron ni esperas ĝui ĉeestan renkontiĝon tiel riĉan kiel unue antaŭvidite, kun la samaj ecoj tiom altiraj ĉe la hispanaj kongresoj.

La praktikajn informojn pri la kongreso eblas trovi en la retejo http://esperanto.es/kongreso/, kaj oni povas aliĝi en la adreso http://www.esperanto.es/kantea/eo/aligilo/.

## MADRIDAJ KUNVENOJ

Dum tiuj ĉi pasintaj monatoj daŭris la unuasabataj rendevuoj en la strato Esperanto de Madrido, konkrete en la polpejo Pulpería O Miño, numero 2 (metrostacio Alsacia, lineo 2). En marto ni planas kunveni la sabaton 5an, denove je la 18,30 horo en la sama loko. Memoru ke ĉiu estas bonvena, sendepende de la nivelo de la lingvo, kaj ke la babilado estas tute libera.

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Tamen, plu ne estas antaŭvidataj la ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL dum tiu ĉi monato, ĝis novaj planoj.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

(NOTO: La februara numero ne aperis pro personaj cirkonstancoj de la redaktisto; ni bedaŭras tion)

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

~~Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo~~

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com